

## & Malliberulo:

< Rekante 29 el 59 batoj por strofo, entute 413 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Vasiliĵ Devjatnin (Verkaro de V. N. Devjatnin, Hachette, Parizo 1906). Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Dektria numero.>

### (#Melodio:

<:59> (

/mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi; mi re rere do dodo re rere mi mi;mi so soso la soso fa mi;

(#Rekantaĵe: mimi rere do dodo dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi; mimi rere do do dodo redo mi mi; soso soso la so fa mi i)

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 Ne besto sovaĝa, fermita en kaĝo, ;  
De ĉeno fortika sin ŝiras, ; Ne gaja  
birdeto, kaptita per reto, ; Pri freŝa aero  
sopiras, -

(×: **Vidu, suno levas nun sin por nova  
tago ; kaj ne zorgas niajn agojn ; kaj  
ĝi superpasos nin ĝis la vespero ;  
dum klopodas ni sur tero.**)

'2 De ĉeno sin ŝiras, senfine sopiras ;  
Junulo tre bela, tre brava! ; Predikas li  
veron, justecon, liberon, ; Kaj pensis,  
ke estas li prava. ....

'3 Revanto ne vidis, ke ĉiuj nur ridis ;  
Je lia parolo sovaĝa: ; Sin amo inspiris,  
sed ĉiuj rediris, ; Ke estas li homo  
malsaĝa! .....

'4 Li multe suferis, li multe esperis, ; Li  
kredis, ke venos libero, - ; Kaj ree kun  
flamo predikis pri amo, ; Pri paco  
tutmonda, pri vero. ....

'5 Ho, kia eraro! Neniam homaro ;  
resonos al voko predika: ; Homaro -  
prudenta, kaj estas sensenta ; Al voko  
malforta amika! .....

'6 Sed li ne silentis: li pensis, li sentis, ;  
Ke homoj lin fine komprenos, ; Ke liaj  
amikoj al liaj predikoj ; De ĉie kun ĝojo  
alvenos. ....

'7 Kaj jen rezultato: li en kazemato ; En  
ŝarĝaj katenoj nun sidas, ; De ĉeno sin  
ŝiras, senfine sopiras, ; Kaj vane liberon  
avidas. – .....